

BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

Enhavo:

Miti: Paĝoj el mia taglibro.

Lenĉjo Ivanov: Al la suno.

Atanas Lakov: La espero.

Atanas Pavlov: Nia standardo.

Petro Dinekov: Nokte.

Stela Morbilli: Ĵetita ŝtono.

Prof. Ivan D. Ŝiŝmanov: La taskoj
de la literatura kritikisto.

Slavka Stiplieva: Ĝenerala karaktero
de la bulgara popolkanto.

At. D. Atanasov — Ada: La bogomilismo.

Notoj; Bibliografio.



Bibliografio

Libroj

L. Tolstoj. Dio—unu por ĉiuj (Surata kafejo), el la rusa trad. Anna Ŝarapov. Tutmonda Biblioteko je la memoro de L. Tolstoj. № 1. Eldono de la firmo „Posrednik“, Moskvo, 1912. Malgranda formato, 12 p., prezo sv. fr. 0'15.

L. Tolstoj. Unu animo en ĉiuj, trad. A. Ŝarapov. De la sama biblioteko № 2, en la sama eldono, 15 p., prezo sv. fr. 0'15.

L. Tolstoj. Unua ŝtupo, aŭ senmortiga nutrado, trad. A. Ŝarapov. De la sama biblioteko № 3, en la sama eldono, 45 p., prezo sv. fr. 0'50.

L. Tolstoj. Per kio homoj estas vivaj, trad. N. Kabanov. № 4 de la sama bibl., en la sama eldono, 32 p., prezo sv. fr. 0'30.

L. Tolstoj. Dio vidas vĉeron, sed ne baldaŭ diros, trad. N. Kabanov, № 5 de la sama bibl., en la sama eldono, 16 p., prezo sv. fr. 0'15.

L. Tolstoj. Du maljunuloj, trad. N. Kabanov, № 6 de la sama bibl., en la sama eldono, 31 p., prezo sv. fr. 0'30.

L. Tolstoj. Kie estas amo, tie estas Dio, trad. N. Kabanov, № 7 de la sama biblioteko, en la sama eldono, 19 p., prezo sv. fr. 0'20.

L. Tolstoj. Sieĝo de Sebastopolo, trad. N. Kabanov, № 8 de la sama bibl., en la sama eldono, 71 p., prezo sv. fr. 0'60.

L. Tolstoj. Kaŭkaza militkaptito, trad. N. Kabanov, № 9 de la sama bibl., en la sama eldono, 36 p., prezo sv. fr. 0'30.

Max Butin. Esperanto-Leitfaden für den Kaufmann. Deutsch-Esperanto-Bücherei № 8. Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H., Berlin und Dresden. 1926. Poŝformato, 63 p., prezo 1 germ. marko.

D-ro Edmond Privat. Kursa Lernolibro. En la sama eldonejo, 6-a eldono, 1926. Malgranda formato, 78 p., prezo 0'80 germ. markoj.

D-ro Edmond Privat. Karlo. Facila legolibro. En la sama eldonejo, 9-a eldono, 1926. Malgr. formato, 46 p., prezo 0'50 germ. markoj.

Ferenc Herzeg. Hungaraj rakontoj, trad. A. Panajott. Esperanta Biblioteko Internacia № 21. En la sama eldonejo, 2-a eldono, 1925. Malgr. formato, 48 p., prezo 0'40 germ. markoj.

(Sekvas sur p. 3)

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO :
por Bulgario
40 levoj,
por alilando
250 sv. fr.
au egalvaloro

MONATA ORGANO
DE LA BULGARA ESPERANTISTA
SOCIETO

Adreso
de la Redakcio
kaj administracio :
Sofia (Bulgario),
strato Car Boris, 69

Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado por la lernejoj-bibliotekoj
per cirkulero № 1870 de 27. januaro 1922

Paĝoj el mia taglibro

JAMA, JAMA! . . . Ŝi kuŝas sur la sofo kaj ŝia kapo ripozas sur miaj genuoj. Estas malĝoja mia animo. Ĉu mi ne havas ĉion? Kaj tamen — mi eniris la pordon, transpaŝis la sojlon, la pordo sin firme fermis post mi, kovrante la tutan pasintan tempon per unu senkonsoliga: neniam plu!

Neniam plu. Kaj bedaŭri — estas des pli malsaĝe. La vivaj devas vivi. Jes.

Kuŝu, dormu, karulino. Super vi pendas la malhelaj nuboj de la estonteco. Ĉu niajn animojn ne trafos ia doloro? Diablo ĝin scias. Dormu, virino. Kio estas la virino? — korpo. La animo estas tiel malmulta ĉe la virinoj same kiel ĉe la viroj. . . . Sed ŝi estas bela. Diablo, savu vian filon! Igu la virinon homo. Igu min plie homo, ho patro. Mi nur tion deziras.

Estas en Novembro sonoraj tagoj. Kaj la animo deziras ekflugi kaj suĉi dolĉon el la krizantemoj. Nun floras bunto el krizantemoj. Pasio. Sed estas io super la pasio. Kaj ĝi fine venkas. Pro tio mi preĝas al vi, Jama, Jama, donu mian feliĉon!

Ni estis hieraŭ vespere en kino. Kaj mi sentis tian doloron, tian doloron. Ĉu mi ne havas mian „Savitri“? Sed mi estos eterne malbenita serĉi tion, kion oni ne povas atingi. Ĉar mi estas unu malsana animo. Ĉu mi ne deziris vidi en ŝi ĉian superan idealon, ĉu mi ne trovis en ŝi la ĉielan virinon? Mi deziras esti feliĉa. Ho sopiro eterna por feliĉo!

Lasta vespero en Varna. Ĝi ne estas gaja. Kio estas la malĝojo? — sopiro por ĝojo. Mi diris hieraŭ vespere al ŝi, per minora tono, karese kaj tenere mi diris al ŝi: Ĉu vi scias kio min sanigos, kion mi bezonas? — la ĝojon. Nur la ĝojon!

SOLECO. Bruas vento. Estas bele aŭskulti la bruantan venton. Mi sidas, atentas la parolon de la nokto, revas kaj skribas. Nun estas la dua nokto de mia soleco. Mi deziras ĝin. Ĝi estas bela nun post tiom da sangbolado kaj suna varmo. Varna!

Kaj ĉio pasis. Ne, mi ne bedaŭras — la estontecon mi atendas. Ke ĝi estu pli bela! Amen.

— Kion vi faros tie sola?

— Eh, mi ne scias . . . Mi revos pri vi, mi vivos per la espero pri la revido. Mi malĝojos, malĝojos sen vi . . .

Ĉu mi vere malĝojas? Jes.

Ŝtorman vivon mi vivas. La trian horon mi kuŝiĝis, la dekan leviĝis, ĉiujn fraŭlinojn mi amas, pri Marusja mi maldolĉe enuas . . . Kaj mi ludas violone turkajn maane'ojn, kantaĉas en kompanio gajkantojn kaj sonorigas tintilojn en la senzorgeca, frivola takto de iu orienta melodio. Ĉar la vivo devas esti muziko: se ne opero de Wagner, se ne simfonio de Beethoven, almenaŭ maane'o en turka maniero.

Mi estis en vilaĝo Ĉ. kaj revenis ope kun Stanju, Eftimov kaj Daŝa. Zefiro, hej — Zefiro! Prends garde à toi! — kiel diras la francoj. Ĉar mi estas forto, kiam antaŭ mi la malamika armeo konsistas el virinoj.

Morgaŭ mi ree veturos el Marusja. Mia, mia! Mon dieu — kaj tamen tiel malvarme estas, ke ĉia revema humoro iras for, por kaŝiĝi en iun varman poŝon, pro manko de varma dekolto.

Brrr! . . . la piedoj frostas. Eh, somero, somero — kie vi estas nun por ke mi vin benu . . . Mi nun verŝajne manĝos. Eh, ankaŭ tio estas bona, se estas io varmeta, tiel, por manĝo.

— Malvarme, ne estas por sola homo — diris fraŭlino Koprinaĉe la disiĝo hodiaŭ. He, he, he, — vere! Sed kion fari, kiel helpi al si en la neeblo solo? — — —

Ĉion ĉi mi parolas, faras, skribas — pro la malĝojo en mia animo. Eh, ĉu iu povas kompreni kio estas la volo por libero? Sed la leĝo ne permesas esti libera, kaj sur la tero ne estas loko ne venenita de la kraĉoj de l'leĝo. Kaj mi estos eterne malbenita cerĉi tion, kion oni neniam povos trovi. Kannagara! — diras la japanoj. Estu la volo dia! Amen.

Kaj se iu demandas — kial mi estas tiel nekonstanta, mi respondos al li per la vortoj de unu profunda scienco: ĉiu animo estas multvizaĝa. En ĉiu animo estas bono kaj malbono, belo kaj malbelo. Jes. Kaj neniu estas kulpa pro io ajn. Jes. Nun mi ekdormos — eble iam mi sonĝe almenaŭ trovos la veran feliĉon. Tial mi ĉiunokte kuŝiĝas — sed vane ĝis nun. Kannagara!

Miti

Malgraŭ la malamo inter la popoloj, malgraŭ la amo de ĉiu al sia hejmolanda vorto, la helplingvo trudiĝos samtiel, kiel trudiĝis la rekonitaj kiel bono internaciaj rimedoj por interkomunikiĝo kaj kompreno.

Prof. D-ro Miĥail Arnaudov

ESPERANTA ANTOLOGIO

AL LA SUNO

Sur teron la nokto mantelon surtiras
kaj vee, malgaje sopiras
ĝemanta natuŝ,
samkiel malgranda knabino
ploranta por sia partino
dum nokto ĉe l'mur.

Vagadas mi sola. En nokta silento
malicon, malbonon prikantas la vento,
lamentas l'anim —
malĵojon la vento rigora aŭguras
kaj ĝia siblado la koron torturas
en nokto sen fin'.

Naturo vekigās. La sun leviĝanta
surtegas vualon de lum radianta
sur pala ĉiel',

diin malavara, gracia Aŭroro
trezoron de lumo, brilantoj kaj oro
disŝutas sur ter.

Mallum'en l'animo. Malsane mi sentas
nun, kiel demono la koron turmentas
sen ia kompat'.

— Ĉu iam en koroj la amo kaj vero,
samkiel radioj de l'suno sur tero,
aperos, ho frat?

Len ĉjo Ivanov

LA ESPERO

Dum tuta mia vivo malespera
vagadis mi sen cel' kaj am;
kaj vane serĉis mi la homon tute veran,
en tiu mond — kruela dram.

Sed en moment' benita de la sorto,
sur randoj nubaj de la firmament,
aperis la steleto de l'Esper' — konkordo,
gvidant' fidela de la homa sent.

Benata estu o, Espero, vivdonanta
al ĉiu vera fil de l'mond.
Por ĉiam via voko sankta
gvidilo estu por amika nia rond.

v. Sadovec

Atanas Lakov

NIA STANDARDO

Homo-frato, ne plu estu pupo,
la militon igu for!
Hom' por homo ne plu estu lupo!
Ne ekzistu plu dolor!

Satigita estas jam la tero,
ĝi da sang' ne volas pli.
Nun ekregu vero, kaj libero,
kaj frateco inter ni!

Ni komprenu unu la alian
per la lingvo Esperant.
Fratoj, jen la sankta devo nia!
Ĉiu estu batalant!

Malamikoj tion ne permesas,
ilin helpas ankaŭ Di',
la armiloj, pretaj ĉiam estas,
ĉiuj estas kontraŭ ni.

Sed ni ĉiuj, pacemuloj karaj,
brave unuigu nin!
Ĉiuj sub la flagon de l'homaro —
tie sonas verda himn'!

Homo-frato, ne plu estu pupo,
la militon igu for!
Hom' por homo ne plu estu lupo!
Frapas la dekdua hor!

Stanimaka

Atanas Pavlov

NOKTE

Nokte . . . mallume . . .

Blovas vent dume . . .

Kantas kviete

la arbareto.

Sur la ĉielo

brilas la stelo:

sola — izola

stelo konsola.

Mi, vojaĝanto,

marŝas tra l'kampoj.

Mia espero

— vojo al vero —

estas en ĝi.

For de l'feliĉo,

for de la riĉo

marŝas nun mi

Sofia

Petro Dinekov

Jetita ŝtono

Al unu „zorgema“ patrino.

Du amikinoj ofendiĝis kaj disiĝis. La ofenditino diris forironte: -- Mi revenos, apenaŭ kiam revenos al mi la ĝojo kaj kiam vi petos de mi pardonon pri okazinta ofendo. Kontraŭe ni revidos nin neniam. Mi iros kamaradiĝi kun almozulinoj. Adiaŭ!

La forlasitino rigidiĝis kaj enpeniĝis: — Ĉu ŝi mem iru ŝin postsekvu aŭ delegu iun ŝin ĉiam postsekvadi? Ĉu ŝi ja ne interesiĝu plu? Sed ne; la okazaĵo estas grava: oni devas ion fari. Alie en ambaŭ forvelkos la animo.

Kaj ŝi iris sin konsili kun alia kamaradino de sia amikino. Rakontis al ŝi ĉion, sed ne ricevis konsilon. Tiam ŝi iris dualoken — tie, la samo. Fine ŝi envojiĝis al tria persono — unu saĝa virino, kiun ŝi malmulte konis. Rakontinte ĉion al ŝi kaj respondinte al ĉiuj demandoj de l'virino, la lasta diris al ŝi memfide kaj severe:

— Mi riproĉetas vin. Unue — se vi ne estus konduktinta malsperte kaj malatente, ŝi ne foriĝus de vi. Due — se vi estus metinta ŝin apud vi kaj milde pridirinta al ŝi, ke ŝi glatigu sian ofendmaldolĉecon, ŝi obeus vin kaj vi havus ŝin. Trie — post la akriĝinta konflikto kaj nova situacio, vi devis sola agi kaj scii kion vi ambaŭ havas, kaj ne aperigi ĝin antaŭ okuloj de ceteraj. Mi estas ja la tria persono, al kiu vi rakontis vian malĝojan historion. La duan personon vi eĉ petis fariĝi via spionino, per kio antaŭ ĝi vi mortigas la indecon de via amikino kaj ŝin mem faras kanaĵino. La unua persono, kiu nenion scipovis al vi diri, depost nun certe vin ŝatos pli malalte, ĉar ĝi diros al si mem, ke vi malhavas sufiĉan aŭtoritaton kaj spertecon por mem agi. Mi ja — sed, ni ne parolu, kion mi diros al mi ensolece. Mi vin riproĉetas. Vi kaŭzis la situacion; vi subaĉetis al spioneco, kaj plej grave — vi subfosis kiel la aŭtoritaton de via amikino, tiel ankaŭ la vian propran. El tio ĉi kreskos nur malbono. Tute alie estus do, se vi agus sola. Alvoku ŝin, preparolu kun ŝi milde, sed ne kolere, kaj ŝia ofendmaldolĉeco forpasos. Ŝia animo saniĝos post la kuraciĝo de la vundo, kiu estas nur provizora, — kaj plus tio ĉi, vi fiere konsciados, ke vi konservis viajn ambaŭ aŭtoritatojn kaj ke vi ne malkarigis vin ambaŭ. Mi bedaŭras multe.

Iru kaj petu la duan virinon, ke ŝi ne spionadu — zorgu realtigi antaŭ ŝi viajn du aŭtoritatojn; kaj mi iros al la unua virino por forviŝi la malbonan impreson, ne denuncante pri mia scio — antaŭ ŝi vi ambaŭ revalorigos. Iru kaj pripensu la diritaĵon!

Se vi koleriĝus pro miaj vortoj kaj kolerege ĵetus al mi malbenon, via amikino rimarkus tion ĉi sur via vizaĝo kaj ankoraŭ pli falus via indeco en ŝiaj okuloj. Ne rigore, sed milde alvokadis kaj akiris la korojn la Nazaretano. Ne riproĉe, sed kunsile

oni helpas la embarasigitajn. Mi vin riproĉetas, sed ne riproĉas; mi vin riporoĉas, sed ankaŭ vin konsilas. Iru do nun!

La forlasita amikino furioziĝis. Ŝi ekmalamis la saĝulinon; eĉ foje ĵetis ŝtonon al ŝia pordo. Tio ĉi estis vidita de la ofenditino kaj en ŝi mem ŝi riproĉis ŝin kaj eksentis pli da malvarmiĝo, kiu ŝin puŝis efektive rilati kun almozulinoj kaj pli kaj pli indigni, rimarkante, ke oni ŝin spionas. Ĉio ĉi alvenigis verajn suferojn, la suferojn de l'unua ekmalamo kaj de la fulma forigado. Kaj tiam? . . .

La forlasitino mem sola paralizis la spioninon, mem sola ekparolis laŭdete pri sia amikino kaj mem sola iris al ŝi, por priparoli kun ŝi milde, sed ne kolere. Kaj kio okazis? . . .

Sekvinte la saĝajn konsilojn kaj aginte laŭ Nazaretano, ambaŭ amikinoj retrovis unu la alian, unu por alia.

Sed kio okazos kun la flankaj personoj? Ĉu sin riparos ilia impresio? Kaj ĉu ne estas ankoraŭ tie — apud la pordo, la ĵetita ŝtono? Kaj ĉu ne restus ĉiame kun spiona animo tiu persono? Jen kie estas la teruro!

Atentu, patrinoj, en viaj rilatoj kun viaj gefiloj. Gardu vian aŭtoritaton kaj ilian indecor.

Varna

Stela Morbilli

La taskoj de la literatura kritiko

El vidpunkto psikosociologia

De longe jam ne plu estas kritikistoj kun la tirana aŭtoritato de iu Boileau aŭ Jonson. La fakto ŝajnas esti en kunligo kun la detruo de la kredo en la absoluta vero kaj kune kun tio ankaŭ en la tiel nomataj eterna j estetikprincipoj. Estante pragmatuloj kaj relativistoj, ni jam nenium rajtigas trudi sian skalon kiel nuran mezurilon de la beleco. Tiu aperaĵo havas tamen evidente ankaŭ sian socialan kialon. Se ni eĉ en la politiko sukcesis liberigi nin de absolutaj regnestoj, evidente ni des malplie povas ilin toleri en la regiono de la belarto. Ĉar, kia funda diferenco ekzistas inter ia Ludoviko XIV kaj ia Boileau? Ĉu la unu kaj la alia ne tenis en la manoj sceprojn? Ĉu la unu kaj la alia ne estis egale tromemfidaj diktatoroj? La diferenco estis propradire nur la jena: la unua imagis, ke la scepro estas al li donita de Dio, kaj la alia — de Apolo. Alie iliaj manieroj kaj taktikoj estis la samaj, iliaj juĝdiroj — senapelaciaj. L'état c'est moi povis diri ankaŭ Boileau en la literatura regno de la XVII jarcento. —

Kun la demokratizo de la socio tamen, precipe de post la XVIII jc., ne povis ne malfortiĝi ankaŭ la despotismo en la kritiko. Ĝi lernis esti antaŭ ĉio pli modesta. Ne vane Sainte Beuve, Taine, Brunetière, Brandes, Heneken, Guyau k. a. rezignis recepti normojn kaj kontentiĝis klarigi la literatur-fenomenojn per la

raso, per la fizika, la socia kaj la ekonomia medio, per la historia momento, per la persona kaj masa psikstato k. a. Kaj Jules Lemaitre iris per sia impresionisma kritiko ĝis tien, ke li permesis al ĉiu sin gvidi, en taksado de la belarto, laŭ la kaprico de siaj subjektivaj humoroj. La impresionismo estas tamen la malo de la dogmatismo en la kritiko. Nur, la unua kaj la alia esprimas du diversajn gradojn en la evoluado de la socia penso de XVII ĝis XII jarcento. Ĉu bone, ĉu malbone estas, ke la kritiko evoluis kaj ankoraŭ daŭre evoluas en la direkto de pli granda libereco de la individua gusto, — pri tio ne sin okupas la literatur-historiko. Li okupiĝas pri scienco. Lia tasko estas klarigi. Tiu objektiva psikosociologia vidpunkto verŝajne ne kontentigos tiujn, kiuj serĉas normojn, kaj ne proksimumajn laŭleĝaĵojn. Jen kial multaj homoj ĉe ni ankoraŭ hodiaŭ sin demandas: en unu lando kun ankoraŭ malforta artkulturo kaj ĉe la kaoso, reganta en la vidpunktoj pri dezirata evoluo en nia literaturo, ĉu estas pli bone, ke aperu forta absolutista kritiko á la Boileau, Jonson, Lessing aŭ Belinski, kiu metus ĉiun en la ĝustan lokon, aŭ estas preferinde antaŭgardi la junan verkistan generacion kontraŭ literatur-diktatoroj?

Ordinare, kiu demandas, tiu respondas laŭ sia persona temperamento kaj laŭ la sociala mondrigardo. Naturoj kun pli-malpli absolutismaj tendencoj emas subteni la unuan eblaĵon. Al ili estus agrablega kritikisto - tondroĵetanto, kiu per sia scepro sen-ceremonie rompus kapojn kaj reputaciojn. Homoj kun pli liberemaj konvinkoj preferos la aperon de kritikisto kun sibtila estetika perceptemo sed ankoraŭ kun prudenta kaj elasta volo, kiu agas multe plie per kompreno de la artindividualecoj de la aliaj kaj per ĝusta koncepto ankoraŭ de la socievoluo. Ĉi tiuj homoj opinias, ke tia kritikisto vere ne tenos sceptron en la manoj, ne estos tondrodonanto, kiun timegos junaj kaj maljunaj, li ne estos ia moloho, al kiu oni eterne devos oferedoni vivantajn oferojn, sed li havas ion pli fortan ol ĉiu scepro: la aŭtoritaton, kiun donas la profunda historikoncepto de la estetikproblemoj. Tia kritikisto povas ĉiun meti en la ĝustan lokon ne havante la reputacion de literatura tirano.

Mi devas konfesi, ke tiu kategorio de kritikantoj de la kritiko pli trafe esprimas la epokspiriton kaj montriĝas, ne suspektante tion, pli bonaj sociologoj.

La adeptoj de la forta mano ankoraŭ en la kritiko ne vidas, ke la nuntempa soci-evoluo, eĉ ankoraŭ la nia, kiom ajn neregula ĝi estu, ne iras al la direkto de la absolutismo, kvankam tie kaj ĉi-tie manifestiĝas provizore diktatoraj aspiroj sekve de certaj ekstremoj kaj brutalaj perfortoĵoj de la procedo de la soci-evoluo.

Efektive ankoraŭ ĉe ni D-ro Kretev iam provis ludi la rolon de diktatoro en la literaturo. Kaj oni devas konfesi, li havis parte sukceson per siaj senapelaciaj kondamnoj. Memorinda restos speciale lia fanatika krucmilito kontraŭ Vazov, kun la celo lin

forigi de lia piedestalo kaj anstataŭe altiĝi Penĉo Slavejkov. Ĉu ne estas tamen karakteroplene, ke la Kretev-a revo, ludi la rolon de Lessing en Bulgario koincidas kun la politika diktaturo de Stambolov?

Ni tamen momente flankenlasu la sciencon, kiu volas klarigi, kaj ne juĝi, kaj ni vidu, ĉu ankaŭ de pure praktika vidpunkto la absolutista kritiko estas ĉe la nunaj niaj kondiĉoj preferinda antaŭ la relativista?

Kiu el ambaŭ estas por la nuno pli utila?

Al mi ŝajnas, ke la adeptoj de la unua estas viktimo de optika trompo. Al ili ŝajnas, ke ĉar Boileau, Jonson, Lessing, Belinski antaŭiras grandan literaturan epokon aŭ estas la kaŭzintoj de tiu epoko. Kvazaŭ Boileau kreis Racine-on, Lessing-Goethe, Belinski—Gogol-on. Sed kiun kreis la terura angla kritikisto de la XVIII jarcento, Samuel Jonson? Naskiĝinte en la komenco de la jarcento (1709), mortinte preskaŭ ĉe la fino (1784) en la aĝo de 75 jaroj, li estis atestanto de kelke da revolucioj en la angla literaturo. Sed nutrite per la estetikprincipoj de la per 20 jaroj pli-aĝa ol li poeto Al. Pope, li ne povis iri pli malproksimen ol li, interalie ankaŭ tial, ĉar li apartenis, kiel kutime ĉiuj personoj kun pli-malpli absolutismaj emoj, al tiuj homtipoj, kiuj ne facile evoluas kaj pro tio faras impreson de multe pli tutecaj homoj, ol aliaj riĉaj naturoj, respegulantaj pli senteme en si la ŝanĝojn de la ĉirkaŭanta medio. Kaj tiu stabileco, mi dirus glaciigo de la principoj ĉe kritikisto, unuigite kun despotula volo, povas iĝi treege malutila precipe por juna literaturo. Tia kritikisto malhelpas senpere per sia peza figuro al la junaj talentoj, manifesti sian originalecon. Li malebligas al ili la spiradon, li ilin frakasas per sia peza kritika bozdugano *). Mi refoje ekzempligas Jonson-on. La literaturo en la fino de la XVIII jarcento delonge ankaŭ en Anglio estas antaŭenirinta. La junaj poetoj volas ŝiri la kondiĉligajojn, kiuj kuntenas ilin kun la formoj de la pasintaĵo. Por ili Pope kaj Dryden ne plu estas la plej grandaj verkistoj. Sed Jonson daŭrigas incensi timianon al la malnovaj idoloj. Kaj ĉar neniu kuraĝas kontraŭdiri, li imagas, ke de li dependas ankoraŭ difini la direktojn de la literaturevoluo.

Jen tamen venis la morto kaj la tuta mondo elripozis. La nekrologoj en la gazetoj konkuris akcenti la „grandegajn“ meritojn de la „granda“ kritikisto. La literaturaj salonoj profunde funebris, sed la junaj poetoj kaj verkistoj en sia animo jubilis. Ĉar ne plu estis la sengraca tirano, ilin eterne traktinta kiel infanojn, kaj al ili neniam permesinta eĉ la plej etan devojiĝon de la malnova rutino. Lia terurplena bozdugano de Krali-Marko **) falis tondre teren kaj ĝi estis tiel peza, ke ne troviĝis aliulo, kiu povus ĝin plue levi. Tie ĝi kuŝas polvoplene ankaŭ hodiaŭ. Anglio, la plej tipa lando de la persona libereco kaj de la individualismo,

*) Armilbastonego.

**) La nomo de bulgara legendara heroo.

eĉ volante, ne povas krei ĉe la hodiaŭaj kondiĉoj duan despoton kiel Jonson.

Mi prenis kiel ekzemplon tiun kritikiston, ĉar ĉe li plej tipe harmoniiĝas ĉiuj negativaj ecoj de la absolutaj leĝdonantoj sur la Parnaso. Ĉar ankaŭ pri Boileau oni povas multilate diri la samon, kion mi diris pri lia angla kunfrato en la XVIII jarcento. Ankaŭ Boileau havas sur sia animo nemalmultajn literaturajn mortigojn. Liaj viktimoj estas nombrataj je dekoj. Lia „Art poétique“ ĝis la revolucio mem de la romantiko daŭrigis recepti „eternajn“ regulojn por la poetoj.

Jen kial mi opinias, ke ankaŭ el pozicio pure praktika, absolutista kritiko á la Jonson kaj Boileau ĉe ni ne estas eĉ dezirinda.

De ĉi tie oni ne devas tamen fari konkludojn por eternaj tempoj kaj precipe iri en alian ekstremon, kiel ĝin faras ofte ofenditaj de la kritiko junaj verkistoj: nei entute la utilon de ĉiu kritiko. Ĉar, kion ajn oni diru, la kritiko estas necesa. Nur, estas postulende, ke ĝi sciu la limojn de sia aŭtoritato, kaj siu gardu interveni en regionojn, kie ĝi ne estas konvena. Kaj antaŭ ĉio ĝi devas rezigni la pretendon, krei talentojn kaj geniojn kaj due: rezigni la manion fiksi estetik-normojn por eternaj tempoj.

La taskoj de la kritiko estas, laŭ mi, multe pli modestaj, tamen ne malpli gravaj:

- I. Malkovri la talenton kaj purigi ĝian vojon;
- II. Prepari la publikon taksi tiun talenton sen la pretendo tamen de papa senerareco.

Krom tio en fazoj de evoluo, kiajn travivas ankaŭ la bulgara juna literaturo, estas preferinda, laŭ mi, la kritiko de la belaĵoj antaŭ la kritiko de la eraroj, kiuj devas esti korektataj ĉiam per delikata mano, per vera kunsento kaj bonvolemo al la aŭtoro.

Ĉi-rilate mi konsentas la opinion de Guyau (komparu L'Art au point de vue sociologique), ke la supera tasko de la arto estas vekti simpatiojn, kunsentojn. Jen kial ankaŭ la kritiko neniam devas esti malica. Prave diras Guyau aliloke, ke kiu kritikas multe kaj maljuste, estas malutila sociala besto kaj ke la simpla popolo estas multfoje pli bona juĝanto, ĉar ĝi estas gvidata senpere de siaj simpatioj kaj komuniĝas kun la verkisto kaj la poeto kun neniam kaŝitaj celoj. Tre prave rimarkigas ree Guyau ke „eble estas utile malkovri ian makuleton en iu diamanto, sed ke estus ankoraŭ pli bone trovi diamanton en la sablo“.

Ĉu per tio mi volas diri, ke la kritiko de la eraroj devas esti ekskluzata? — Tute ne. La kritiko de la eraroj (kiu ne estas tamen identa kun la malica neanta kritiko) sendube utilas tie, kie precipe estas koncernate antaŭgardi la publikon de certaj malutilaj forlogiĝoj. Sed ankaŭ ĉe tio oni ĉiam devas memori, ke ankaŭ tiu kritiko devas esti farata kun simpatio al la efektive, la senkondiĉe sincera talento, kun granda atentemo kaj kun plena konscio pri la relativeco de ĉio homa.

Prof. Ivan D. Šiřmanov

Ĝenerala karaktero de la bulgara popolkanto

La popola kanto bulgara estas „neelĉerpebla trezorejo“, diras ties unuaj kolektistoj — ambaŭ Miladinov — niaj fratoj Grimm. Laŭ sia kvanto ili estas nekalkuleblaj, kaj laŭ deveno multaj el ili venas de la profunda antikva epoko de la mitoj. Ili tamen ne estas nuraj arkaikaj restaĵoj ĉesigintaj sian evoluadon kaj malaperintaj kvazaŭ sekigita fonto. Ili portas la vivantecon de organismo, tavolojaĵojn de novaj tempoj kaj ideoj. Tial ili ĝenerale estas divideblaj je antikvaj — mitologi- kaj kristanlegendoj kaj kantoj de nia kvincentjara sklavepoko. Kaj kiel literaturspecoj ili estas eposaj, lirikaj kaj ĥoraj (ĉe la rit- kutimoj konservataj ankoraŭ ĝis hodiaŭ).

Jam ekde pratempe en la literaturevoluo de nia popolo rimarkeblas aperaĵo, ne renkontebla ĉe la ceteraj popoloj de Eŭropo. Ni ĉiam, eĉ de post la 9-a jarcento, havis unuflanke individuecan literaturon de verkistoj apogataj de la eklezio kaj de la ŝtato kaj aliflanke — riĉan popolan folkloron. Ili interspacis malproksime unu de la alia, kvazaŭ polusoĵ. Kaj nun ĉe ni la pli granda parto de la popolo vivas en sia ordinara vivo kun la popolkantoj hereditaj de la praavoj, kaj nia nova literaturo staras sur nivelo alirebla nur por mallarĝa rondo de homoj. Plena kreunuiĝo ne estiĝis. Tial la bulgara popolkanto vivas ĉe ni kiel ĉe neniua alia nacio. Ĝi akompanas nian vivon ĉe laboro, ĉe festoj kaj ĉe ritoj eĉ en la vivo de la inteligentulo. Tiu vivanteco kaj intimo kaj parenceco ebligas al ni la facilan kapablon karakterizi la popolan kanton, ĉar ĝi ja kuŝas en ni mem. Kaj ĉiu bulgaro facile povas paroli pri la popola kanto same, kiel li povus paroli pri si. Grandan malfacilaĵon ne prezentas eĉ la plej antikvaj kantoj, ĉar ankoraŭ ekzistas la legendoj pri la feiuloj. En tiu regiono jam la bulgara folkloroscienco multon faris, bazinte sian laboron sur la multenombraj popolkantaroj*).

„La kantkapabloj de la bulgara popolo laŭ la viveco de sia poezio staras pli alte ol tiuj de multe da aliaj popoloj — diris la rusa akademiulo J. Sreznevskij. Sed ni mem nian nacian kanton estimas, ĉar tie ni vidas la homon, ĉar ĝi ne estas falsa kaj ĉar ĝi difinas pli ol ĉio cetera nian nacian karakteron. Tiele la Serba nacikanto bildas plejparte la serbajn reĝojn, admiras ilin, ploras la malfeliĉojn de la Kokosovo-kampo ktp.; — la Rusa estas precipe religioza, ĝi preĝas por la orfa Lazaro kaj por la rusaj nobeloj; kaj la Bulgara estas plejpatre m o r a r a, h e j m a epopeo de la ĉiutaga laboro de terkulturista popolo, kiu komunkaĝas kun la naturo kaj al kiu ĝi ankoraŭ konservas panteisman kulton.

En la mitologi- kantoj respeguliĝas aparta mondrigardo. La naturfenomenoj kaj elementoj, estante ĉio por la terlaborista

*) En 1861. la kantaro de Fratoj Miladinov, eld. en Zagreb; 1871. la kantaro „Поэзия словянъ“ — Gerbel; 1875 „Chansons populaires Bulgares“ — A. Dozon, k. a.

popolo, igis ĝin traseri ilin kaj ilin simbolizi en bildojn zoomorfajn aŭ antropomorfajn. Tiel la frumatena printempa nebulo, kiu formanĝas la semaĵojn kaj faras domaĝon, aperas en la mitologia estaĵo de Bazilisko kaj Drakoj, figuroj de bestoj kun fabela koloraĵo. La bonfaraj fortoj aperas en la persono de homestaĵoj, feinoj ktp. La mito pri la suno ankaŭ povas formi ciklon da kantoj. Ĝi ofte aperas kiel rivalo en la sin manifestantaj krefortoj kune kun bravuloj, kun kiuj ĝi konkuras. Al ĝi estas atribuita la edziĝo al la plej bela fraŭlino en la vilaĝo. Kutime ĝi forŝtelas ŝin, sendinte teren „sunlulilojn“ en la tago de Sankta Georgo — la festtago de la ekflorinta naturpotenco (komence de Majo).

Pleje tipaj tamen estas niaj mor-kantoj. Ili estas plej multnombraj kaj ĉiun laboron akompanas. En ili reflektiĝas la plej karakteriza eco de nia nacio — la laboremo. Nia poezio estas tiu de la terlaboro. La mezuriteco de la movoj ĉe la diversaj specoj de laboro kreis malsaman ritmon, kaj per tio ankaŭ specojn de kantoj: rikoltistaj, pastoraj, rondodancaj ktp. La malsameco de la suĝetoj dependas de la festtagoj, dum kiuj estas kantataj kelkaj el ili, ekz.: kantoj de Enjovden, de Sankta Georgo, kristnaskaj, de Sankta Lazaro, paskaj. Ĉiuj ili tamen altigas la terlaboron en kulton kaj vivsencon. Estas impulsata kaj ambiĉiigata la agado, ekz. la konkuro ĉe rikoltado. En aliaj kantoj renkontiĝas okazaĵoj el la vivo pastora. La kristnaskaj ditirambas la naskiĝon de la „Juna Dio“ Kristo, malantaŭ kio videblas la iama bildo de la suno. La Lazarkantoj, kantataj printempe, samtiel glorigas la naskiĝantan potencon de la sunenergio. La Georgaj — Majkantoj — esprimas la jubilon pro la abundo kaj la fruktodono. Tiuj de Enjovden (7. de Julio) — aŭtunaj — kantas la florojn kaj ilian kuracpovon. Ili estas kantataj ĉe la kolektado de kuracherboj por la vintrotempo.

Entute ili ne nur subtenas la fortostreĉon ĉe la laboro, sed ili ankaŭ donas sanan mondrigardon al la terkulturista popolo. La naturo okupas centran lokon en tiu mondkoncepto, speciale nia Balkana naturo.

La bildo de la Balkan-montaro renkontiĝas ĉie. Ĝi estas kaŝejo de la legendaj estaĵoj, en ĝi loĝas drakoj kaj feinoj, ĝi estas ankaŭ ŝirmanto de nia libero, en ĝi la lasta konserviĝis en la persono de la iamaj „hajdutoj“ (ribeluloj). Al la arbaro kaj al la montego ĉiuj plendas, dividas kun ĝi angorojn kaj ĝojojn kaj ĝi, kvazaŭ vivanta estaĵo, simpatias kun ili.

Do la fruktodono de nia kamparo kaj la bestoj kunlaborantaj en la terkulturo, ĉio konturiĝas sur la majesta fono de la Balkano, sub ties ombro ĝermis niaj mirindaj popolkantoj.

Kaj interesa fakto: se fremdulo pasus tra la bulgara lando, li aŭdus ĉi-kantojn ankaŭ hodiaŭ vivantaj en la sino de la bulgaro: sur la kamparo aŭ en lia hejmo.

La popolkanto estas la animo de la bulgara nacio, ĝi subtenis ĝin dum sklaveco, ĝi kuraĝigas kaj nutras ĝin ankaŭ hodiaŭ.

Slavka Ŝtiplieva

La Bogomilismo

(4)

Post ĉio dirita ĝis nun, ĉu estas malfacile klarigi, pro kio a bogomilismo havis tian grandegan sukceson? Ne la religia flanko, sed ĝuste la socia enlasis radikojn profunde en la popolon. La eklezio vane serĉis tiujn radikojn en la religia instruo, kaj senfrukta restis ĝia penego elradikigi la danĝeran movadon. Kompreneble, la potenculoj persekutis la bogomilismion. La reĝoj, pro instigo de la pastraro, batalis kontraŭ tiu ĉi revolucia movado. Tri kongresoj estis kunvokitaj en Bulgario de la reĝoj Borilo (Boriso II) kaj loano Aleksandro kontraŭ la bogomilismo. En tiuj kongresoj kunvenis altrangaj pastroj kaj oni invitis la bogomilismajn predikantojn al disputo, por respondi pri sia instruo kaj pledi por ĝi. Poste la kongreso alprenis decidojn — kompreneble kontraŭ le herezo.

La unua kontraŭbogomilisma kongreso okazis en 1200, kunvokita de reĝo Borilo, pro instigo de la roma papo Inokentio III. La reĝo invitis la herezulojn aperi antaŭ la pastraro, deklarinte, ke nenio malbona estos farata al tiuj, kiuj venos kaj defendos sian instruon antaŭ la juĝkongreso. Kaj tiaj efektive venis. Tamen la reĝo ne plenumis sian promeson: oni indulgis nur tiujn, kiuj konsentis forlasi la bogomilismion. La obstinajn oni anatemis kaj malliberigis. Pri tiu ĉi kongreso nome estas la dokumento „Sindikto de reĝo Borilo“, kie estas formulita jenmaniere la anatemo: „Al la trifoje malbenita (триклегъ) Bogomilo, kaj al lia disĉiplo Miĥailo, kaj al Teodoro, Dobri, Stefano, Vasilio, Petro kaj al liaj ceteraj disĉiploj kaj samideanoj, kiuj trompas, ke la Dia enkorpiĝo estas nur ŝajno sed ke Li ne akceptis sian karnon de nia sankta kaj purega regantino la Dipatrino, al ĉiuj ili anatemon“.

La dua kaj la tria kontraŭbogomilaj kongresoj estis kunvokitaj de la reĝo loano Aleksandro: la dua en 1360, la tria en 1365. Motivojn por kunvoko de la dua (1360) donis la agado de Lazar kaj Kiril Bosota en Tirnovo, pri kiuj mi jam menciis. La kongreso kondamnis la bogomilismion kaj oni proponis al la herezuloj forlasi ĝin. Lazar, kiu atingis ekstremecon ĉe sia propagando, irinte nuda tra la stratoj, nun ektimis kaj forlasis la herezon. La ne tiom paradinta per la ideo Kiril Bosota montris sin pli persista. Li kaj lia disĉiplo popo Stefano rifuzis obei tiun kondiĉon. En la biografio de Sankta Teodoso ni legas: „Tiam la reĝo ordonis, ke oni brulsignu per varmegigita fero iliajn fruntojn kaj elpelis ilin for trans la limojn de la regno“.

Tiuj ĉi juĝkongresoj kaj la persekutoj ne povis elradikigi aŭ limigi la herezon. Bulgario brulis tuta pro ĝi. La ceteraj popoloj konsideris Bulgarion kiel herezan ŝtaton. Papo Gregorio la IX deklaris en 1328 krucportan militon kontraŭ la hereza Bulgario kaj ordonis al la hungara reĝo Bella IV eniri en la landon kaj restigi por si ĉiun regionon, kiun li purigos de la herezo. Tamen Bella, kiu estis tiam en bonaj politikaj rilatoj kun la bulgara reĝo, ne faris tion.

La nomo „bulgaro“ en okcidenta Eŭropo estiĝis sinonimo de „herezulo“. Estis ordinaraj esprimoj ĉe la tiamaj verkistoj: „haeresis Bulgarorum“, aŭ „haeretikos quos Bulgaros vocant“, k. c.

La bogomilismo penetris baldaŭ en la najbarajn landojn. En Bizantio precipe dum la regado de Aleksandro Komnen estis tre vastigita. En Konstantinoplo agis iu bogomilano nomata Vasilo. La aŭtoritatoj kaptis lin. Oni kondukis lin al la reĝo, kiu akceptis lin afable kaj sciigis al li ke li mem deziras per la nova instruo ricevi savon por sia animo. Tiel trompita, Vasilo konfidis al li la bogomilan instruon. Post tio la imperiestro kunvokis konsilantaron, kiu pridiskutis kaj kondamnis la instruon. Oni proponis al Vasilo, ke li malkonvertiĝu. Li ne konsentis, malgraŭ la fortaj admonoj de la imperiestro mem. Oni kondamnis lin je brulmortigo. La Bizantia historiisto tiutempa rakontas, ke Vasilo firme, sen hezito kaj sen timo, ekpaŝis al la brulonta lignaro, ripetante unu verson el la psalmoj. Sed kiam li rimarkis siajn disĉiplojn, turmentitaj kaj gardataj de soldatoj, venigitaj por vidi la dolorplenan morton de ilia majstro — kaj la imperiestro ja konvinkis lin, ke ili estas liberaj — li maldolĉe ekploris.

Post tio Al. Komnen ordonis al Eŭfimio Zogabeno priskribi en unu libro la instruon de la bogomilismo, kaj tiel aperis la jam menciita verko *Πανοπλία δογματική*.

En la XI j. c. en Konstantinoplo jam estas bogomilana komunumo. Dum la latina regneco en Bizantio, en Konstantinoplo ekzistis du bogomilaj komunumoj.

La bogomilismo penetris en Rumanion, Rusion, Serbion, Bosnion, de tie Dalmacion, kaj ekrapis al Italio, Svisio, Francio.

En 1004. en Kiev aperis kaj agis la bogomilano Adrian. En 1123 en Rusio propagandis la bogomilismen iu Dimitrij. Iuj konsideras ankaŭ la sekton de la „Strjagolnikoj“ en Rusio kreita sub bogomilisma influo.

En Serbio la bogomilismo aperis en la XII jarcento; ĝi estis multe propagandata en 1159. Ĝin persekutis reĝo Stefano Njeman. En la XIV jc. ĝi denove aperis; nun ĝi estas persekutata de Stefano Uroŝ kaj de Duŝano.

En Bosnio la episkopo Natalij en Nin (dum la XV jc.) kaptis tri bogomilajn propagandistojn kaj sendis ilin al Romo, por ke ili estu konvertitaj al la prava kredo — la katolikismo — aŭ punitaj.

En Italio bogomilana komunumoj aperis en multaj urboj de la tuta lando ĝis Sicilio: Mantua, Trevezia, Bergamo, Milano, Faenza, Viguenza, Romo (kie en 1209 ekzistis bogomolisma lernejo), Padua (1224), Breme, Ferara, Napolio, Avreza, Piacenzi, Florencio, Spoleto, Orvietto, Kalabrio ktp. ktp.

En Francio, precipe en la suda parto, la bogomilismo forte enradikiĝis. Ĝin favoris la grafo Raymond, pri kiu oni pensas, ke li sekrete estis bogomilano.

Pli malfrue li estis kruele punita pro sia herezemo. Bogomilana komunumoj ekzistis en Parizo, Orléans, Reims k. c.

En Italio kaj Francio la bogomilanoj havis la nomon „kataroj“ kaj „valdensoj“, Same ankaŭ albigoj. La historion de ilia movado pristudas Schmidt en sia „Histoire de Cathares“. La kataroj formis en suda Francio la albigojan eklezion, kiu konservis sin dum 4 jarcentoj kaj fine per krucporta militiro, deklarita de la papoj, oni detruis ĝin, kruele ekstermite la loĝantarojn de urboj kaj vilaĝoj. Tiam trovis sian morton ankaŭ la reganto Raymond.

La bogomilanoj el ĉiuj landoj sciis, ke ilia centro estas Bulgario. El tie ili ricevadis instrukciojn, instruistojn kaj librojn. Se aperis en iu komunumo malkonkordo pri principa demando, tien oni sendis el Bulgario „starejšina“ *) por solvi la demandon.

Inter la kataroj en Francio kaj Italio komence dominis la modera dualismo. La Druguria bogomila organizaĵo (Ordo Druguriae en Bizantio) sendis tien iun Nikit o'n, kiu komencis propagandi en Lombardio kaj en suda Francio la absolutan dualismon, kaj kiu en 1167 kunvokis por la sama celo kongreson en Saint Felix de Caraman (apud Toulouse). Tio ĉi pligrandigis la influon de Ordo Druguriae. La bulgaraj bogomilanoj ne malviglis. Ili tuj sendis tien iun Petracus (iuj opinias, ke li eble estas la sama Petro, menciita en la Sinodikto de reĝo Borilo, verŝajne klera kaj aŭtoritata bogomilano), kaj li restabiligis la influon de Ordo Bulgariae en tiuj lokoj.

La apokrifoj „Sekreta Libro“ (aŭ latine „Liber Sankti Iohannis“) estas eble la unika konservita de tiu epoko verko kun pure bogomilisma karaktero (en tia karaktero estas ĝia latina traduko, la redaktaĵo en la malnovbulgara lingvo estas modifita forte en ortodoks-kristana spirito). La kataroj en Francio sciis, ke tiun ĉi apokrifon alportis al ili iu bulgara popo Nazarij el Bulgario.

Nun, rakontante pri tiu granda disvastiĝo de la bogomilismo, pri tiu rolo kaj influo de Bulgario en tiu tro frua epoko — al ni ŝajnas ĉio kvazaŭ fabelo, „ni apenaŭ povas ekkredi“, kiel diras Nikolaj Rajnov. Kaj se ni renkontas ĉion kun miro — ni mem komprenu kiom malmultege ni konas nian historion!

La sorto de la bogomilismo en diversaj landoj estas simila. Ĝi estis sufokita per fajro kaj sango. Historiaj okazintaĵoj skuis Eŭropon... la ensemnitaj bogomilanaj ideoj ŝajne malaperis sub la ruinoj de regnoj. Post kelkaj centoj da jaroj ni vidas samajn ideojn reekgermi, ne tamen jam kiel bogomilisma instruo, sed kiel specialaĵo de okcidenta Eŭropo! Certe malmultaj en Eŭropo, eble eĉ neniuj, sciis en la 18-a jarcento, ke la novaj ideoj pri la rajtoj de la homo, pri la socia vivo ktp. estas malnovaj, naskitaj kaj formulitaj klare en la dum tiu jarcento forgesita Bulgario, kiu en la 11-a jarcento jam transportis kaj vastigis ilin en ilia lando.

La sorto de la bogomilismo en ĝia naskejo — Bulgario — estis decidita per la falo de la regno sub turka jugo. La novaj

*) Membro de la maljunula konsilantaro.

• cirkonstancoj, nenormalaj tempoj, renversis la socion. Ĉiuj bulgaroj tuj egaliĝis: malaperis boljaroj, ĉiuj estis egale premataj de nova premanto: jam oni eksentis, ke la nacieco diferencigas nun premantojn de la prematoj. En tiuj cirkonstancoj post ioma tempo la socia movado ŝanĝis sin en nacia, sed ĝi ankaŭ estis sufokata dum jarcentoj kaj apenaŭ ekbriletis ie ĝia fajrero seripova.

• Mi finas. Mi elmontris, kiom mi povis, la instruon de la bogomilismo kaj ĝian signifon por la vivo kaj por la socio.

En la regiono de la religio ĝi estas reformismo pli frua ol la movado de Luther, kaj prave kelkaj historiistoj nomas popon Bogomilon „malgranda Luther sur Bulgara tero“.

En socia rilato ĝi apartenas al la liberigaj movadoj, kiuj ekludis sian gravan rolon dum la lastaj jarcentoj de la nova historio kaj kreis la grandan proceson de la socia progreso, kiu impulse marŝas de la 18-a jarcento, komencinte de Francio, vastiĝinte en Eŭropo, en la tuta mondo, kaj kiu daŭras ankaŭ nun kaj certe ne baldaŭ atingos sian celatan finon.

Se ni ekrigardos al la historio de Eŭropo dum la lastaj tri jarcentoj, ni vidos multajn lumantajn figurojn de ideologoj pri justeco, homa vivo, rajtoj de la premataj klasoj ktp., — kiuj donis la fermentilon de la nuna socia vivo.

Kaj post kiam ni vidis tiun lumoplenan bildon, tiun panteonon de eminentaj figuroj kaj glorataj nomoj, ni turnu niajn okulojn al nia propra pasinteco. Nia rigardo glitas super la kvin mallumaj jarcentoj de la jugo, kaj ekhaltas al la malnova epoko. Kaj tie, en la krepusko, sur la horizonto, enigme aperas la nek-lara konturo de popo Bogomilo — la enigmo de nia historio, ni a predikinto por libereco, frateco kaj egaleco.

1924.

Atanas D. Atanasov — Ada

• Utnam la adeptoj de l'ideo pri lingvo internacia ĉe ni venku ĉiujn malhelpaĵojn aperantajn kaj aperontajn sur ilia vojo. Ili kreu, ke ili faras laboron belan, laboron noblan. Ili sur sia vojo neflankiĝante paŝu kaj ili memoru, ke ĝuste la prej fortaj socialaj ideoj komence renkontis la plej grandan reagon. Ili nedeiĝante marŝu antaŭen kun kredo je si kaj je sia afero. Ili havas kaj havos por si ĉiam kaj ĉie la simpatian kaj la apogon de ĉiuj, al kiuj estas karaj la progreso tuthomara kaj la bono de la vastaj demokratiaj masoj de la socio.

Prof. D-ro Ivan Ŝiŝmanov

• La lingvo internacia, kia mi deziras ke plurestu Esperanto, estos unuiganta ligilo inter la popoloj de la tuta mondo, donos universalan konscion al la homoj kaj fariĝos potenca elemento en la komuna progreso, helpante la altiĝon ne nur de la menso, sed ankaŭ de la koro, direktante nian animon al plena perfektigo, al egaleco kaj frateco.

Prof. D-ro Benjo Conev

Ĉiam pli intense

bolas nia vivo esperantista. Kaj speciale intense ĉe ni, en Bulgario. Ĉe ni oni povas observi ĝojigan disvolviĝon de la esperanto-fortoj. La ĉi-lastaj disvolviĝas en du direktoj. La unua estas la propaganda agado, kanalizata en la bonega semajna presorgano bulgarlingva „Esperanto“. Senĉese kaj sukcese ĝi trumpetas la ideon pri lingvo internacia. La alia laborkampo estas la interna. Ĝia areno estas „Bulgara Esperanto“,

Per sia nova aranĝo „Bulgara Esperantisto“ jam ebligas al niaj samideanoj pli larĝan svingon en ilia kulturporta laboro. Kaj tiu lasta senteble plivigliĝis. Aperas ĉiam novaj spertaj samideanoj, kiuj firme tenas la esperantan plumon. Jen, en la paĝoj de la modesta „B. E.“ ili ŝlosas la germaĵon de estonta granda kulturo kaj literaturo — ili iniciatas la bulgaran partoprenon en la estonta komuna kunvivo de la popoloj.

Klare desegnita estas la vojo de nia revuo. Ĝi jam konturiĝis en sia unua jarduono. Vere, „B. E.“ diferencas de la ceteraj naci-propagandaj Esperanto-revuoj. Ĝi fariĝis kvazaŭliteratura revuo. Ĝia tasko tamen estas limigita: reprezenti la bulgaran kulturon kaj spiriton tutece kaj ĉiuflanke; esti esprimilo de la vivo kaj apartaĵoj de la bulgara esperantistaro. La nacieco nuntempe ankoraŭ estas ne ignorebla faktoro — eĉ en nia Esperantomovado. Laŭ mi, eraras kelke da samideanoj, opiniante, ke kiel literatura organo aparte bulgara „B. E.“ montriĝas superflua, almenaŭ ĉe la nunaj cirkonstancoj de nia internacia movado. La aludo de tiuj samideanoj pri divido de fortoj, pri konkuro al „Literatura Mondo“, al mi ŝajnas malprava. La afero estas, ke eĉ se „B. E.“ ĉesus sian aperadon, ĝiaj abonantoj apenaŭ estus gajnitaj por „Lit. Mondo“. Tion kaŭzas la kareco de tiu revuo, aŭ pli prave, la malriĉeco de la bulgaraj samideanoj. Krome, „B. E.“ neniel povus esti rivalo de „Lit. M.“, nenia komparo povas esti farata inter la bonega, riĉa literatura revuo kaj nia nacia revueto. Mi tamen preferus, se ankaŭ la ceteraj Esperantorevuoj iom post iom verdigus sin mem. Tio ĝuste estus elmontraĵo de pli intensa interna vivo, pri kiu mi parolas ĉi-supre.

Interna vivo, pri kiu ni ja povus esti fieraj.

A.

NI DANKAS pro la ĝis nun donita al ni kunlaboro je „B. E.“, sed petas, ke oni ne laciĝu en ĝi. Por ke la enhavo de nia gazeto fariĝu kiel eble plej interesa kaj valora, ni ja bezonas la helpon de la legantaro. Nia devizo estu: Ni esperu — sed laboru!

Red.

Redakcia Komitato:

Asen Grigorov — Zahari Zahariev

Naciaj Gazetoj

La Semisto, Jaro VII, Junio, Julio, Aŭg., Sept. kaj Okt. 1925. (Hisp.) — Anocas la aperon de „Kataluna Antologio“ ampleksanta 400 paĝojn.

Litova Stelo, Jaro IV, Okt., Novembro — Nur en Esperanto.

Konkordo, Jaro IV, Okt., Novembro (Jugoslavio). — Invitas la mondkongreson 1928 en Zagrebon.

La Movado, Jaro VIII, Nov., Dec. (Francio).

Marto, Jaro IX, Okt. Organo de Germana E.-Ligo en Ĉeĥoslovakio.

Bulteno, Jaro I, Aŭgusto (Antverpeno, Belgio). — Nur en Esperanto.

Informoj de la E.-Asocio de Estonio. № 44, Okt. — Nur en Esperanto.

Brazila Esperantisto, Jaro XVI, Apr., Marto, Junio 1925.

Germana Esperantisto, Jaro XXII, Nov., Dec.

La Espero, Jaro XIII, Sept., Novembro (Svedio).

Hungara Esperantisto, Jaro VIII, Okt., Novembro.

The British Esperantist, Jaro XX, Nov. — La Novembro listo de la libroj, haveblaj ĉe British Esp. Association, 17 Hart Street, estas tre riĉa.

Intermembra Informilo de la Nederlandaj laoristoj, № 11, Okt. Nur en Esperanto.

Itala Esperanta Revuo, Jaro XII, Okt., Novembro. Kun riĉa libro-katalogo 8-paĝa. Adr.: S. Vito al Tagliamento (Friuli).

La Revuo Orienta, Sept. (Japanio). — Estas sciigata la apero de novaj libroj: Pri la rizmalsano de birdoj, Pri la kvanto de vitamino B rezervita en organoj ĉe beribero, Farmakologia praktiko.

Sciigoj de Loka Societo Dresden (Germ.), Nov.

La Suda Kruco, Okt., (Aŭstralazio).

Amerika Esperantisto, Nov.

Der Arbeiter — Esperantist, Nov., Dec.

La Orienta Lumo, Okt. (Koreo).

Espepanto et Commerce. Nov. k. a. (Francio)

La Suno Hispana, Okt.,

La Instruistaro Hispana, Okt. — Aldonaĵo 4-paĝa, de la granda gazeto El Magisterio Espanol, publikigas enketon pri la situo de la instruistoj en la diversaj landoj.

Aŭstria Esperantisto

Howengasse 12-2-13

Kornenburg

bei Wien

Aŭstrio



ĜU VI JAM ABONIS?

Ĉiunonata gazeto

„LA REVUO ORIENTA“

24—32 paĝa kun
luksa kovrilo

per kiu vi povas konatiĝi kun
orientaj, precipe japanaj litera-
turaĵoj originalaj kaj tradukitaj,
kaj samtempe kun la espe-
ranta movado en Oriento

Abonprezo jara: 7 svisaj fr.

Eldonas:

JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

Uŝigome, Ŝin'Ogaŭa-maĉi III-14

Tokio

Adreso de la administrejo: strato „Car Boris“, № 69,
Sofia (Bulgario).